- 3 – Partopreno nur sabate aŭ dimanĉe inkludante unu manĝon:** **29 €**
Participation samedi ou dimanche seulement comprenant un repas
- 4 – Partopreno en ŝtaĝo sen tranokto kaj sen manĝo(j):** **18 €**
Participation au stage sans hébergement et sans repas
- 5 – Junuloj ĝis 25 jaroj - Partopreno por la tuta arango:** **28 €**
Jeunes jusqu'à 25 ans - Participation pour le stage complet



ALIĜILO al la
BULLETIN D'ADHESION au
17a Nordfranca – Eŭropa Esperanto - Rendevuo

Familia nomo: S-ro S-ino F-ino
Nom de famille: Mr Mme Mlle

Persona nomo: Aĝo (por la logado):
Prénom Age (pour l'hébergement)

Profesio: Telefono:

Retadresu courriel:

Adreso:

EUROPO

La kroniko de komuna Eŭropo komenciĝis en la jaro 1950, sekvis la kontrakti de Romo inter ses landoj, kun posta aliĝo de pliaj landoj. La "ĝengena kontrakti" en 1990 forigis limkontrolojn, tuj poste fondiĝis EU - Eŭropa Unio. Eŭro, la komuna mono en 12 landoj, enkondukiĝis. En 2004 EU pligrandiĝis al 25 landoj.

En mia tutaga ekskurso (fakultativa, 30 dec 2005) ni vizitos la najbaran Luksemburgion, la ĉefurbon kaj la vilaĝon Schengen. En pligrandiĝinta Eŭropo *ŝengen* fariĝis sinonimo por senlima vojaĝo ("*ŝengen*a vizo"). Komatiĝu kun la mozela vilaĝeto (*nur* 350 *enloĝantoj*), promenu tra Luksemburgo, ĝu ŝan malnovan urbon. Restoracia manĝo inkluziva; ĉiĉerono Brian Moon.

Ni invitas vin al interesa kaj alloga vespera programo, precipe al mia tradicia silvestra balo kun polonezo kaj

◦ SILVESTRA BUFEDO ◦

Nia trinkejo *»Krujo«* jam elstarigas en Esperantujo, ĝuu ĝin denove ĉe biero, vino kaj koktelo, en etoso-plena rondo, inter viaj novaj kaj malnovaj geamikoj...

INFORMOJ (1)

• IF estas seminario por lingve spertaj personoj, kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas gravaj • Laŭdire okazas paroligaj kursoj, ekz-e por via partner(in)o • Ni proponas varian programon, t.e. matene kaj posttagmeze altnivelaĵ prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj, kursoj, promenoj kaj tutaga ekskurso, vespere muziko, koncerto kaj danco, balo kaj aktiva kontribuo • Nia programo komenciĝas la 27-an de decembro per la interkna vespermanĝo, programino la 3-an de januaro (kun plilongigo ĝis la 4-a de januaro) post matenmanĝo • Infanoj ĝuas kotizo-rabaton kaj dormas en la gepatraĵ ĉambroj, ekde 14 jaroj eventuale aparta ĉambro (organiza rezervoj) • Infanoj jam havu lingvaĵn konojn en Esperanto • Paralela (dumtaga) programo por la infanoj (laŭ aĝo-grupoj) sub gvido de kunlaborantoj • Sub-tri-jarulin(oj) estas sen-kotizaj, sed la gepatroj okupiĝas pri ilia prizorgo kaj manĝo • Ni povas disponigi infanajn litetojn, sed rekomendas antaŭmendon •

... jarmine al IF

alĝilion sendu al la organizanto

Hans-Dieter PLATZ
Postfach 1148 • DE-34303 NIEDENSTEIN • Germanio
tel./faksno: 056624-8007 • portebila: 0171-4964558
Int: +49 sen komenca 0
repoŝto: HDP@internacia-festivalo.de

IF en Interreto: www.internacia-festivalo.de
antaŭpagon ĝiru al unu el niaj kontoj

Germanio: poŝtĝirokonto 91856-676 (BLZ 54510067)
Postbank Ludwigshafen, je nomo H.D.Platz
internacia kodo IBAN: DE13 54510067 0091856676
BIC (SWIFT): PBNKDEFF

Francio: poŝtĝirokonto CCP 254646 A Strasbourg
je nomo TAKE Esperanto
ĉekoj al: A. Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Balderstheim

Belgio: poŝtĝirokonto 000-0265338-43
je nomo Flandra Esperanto-Ligo (FEL)

Pliaj eblecoj: UEA-konto plat-j / peranto de MONATO
Ĝiron al konto resp. peranto bv merci en la aliĝilo
Ĝiro-lindko: 22-a-IF • Reformlandoj petu nian informon
Se estas pliaj demandoj, problemoj, bv. kontakti nin

INFORMOJ (2)

Aligkonfirmon resp. Duan kaj Trian Informilojn (kun pli detalaj informoj) vi ricevos post aliĝo • La antaŭpago (min. EUR 45 popersone) estas parto de la kotizo; via ĝustatempa ĝiro certigas la aliĝkategorion • Kotizo-kalkulo laŭ la aĝo je 27 dec 2005 • Partatempaj pagoj laŭ tagaj kompletoj; sen silvestra kombino po 16 %, kun silvestra kombino 6 kompl.; po 16 %, 5 kompl. po 18 %, 4 kompl. po 19 %, 3 kompl. po 20 %, 2 kompl. po 21 %, 1 kompl. 22 % - laŭdeziro komenco, ekz-e de mateno ĝis mateno • Partatempulojn kaj pliaĝulojn ni akceptas se (t)estas liberaj lokoj (organiza rezervoj) • Plilongigo: 15 % de la resp. kotizo • Unuila ĉambro: laŭ la disponeblo jarmine • Familia ĉambro: ekde du plenkotizaj partoprenoj • Popersonej subtrahoj ĉe malaliĝo: ĝis 10 nov EUR 15, ĝis 10 dec EUR 30, ĝis 20 dec EUR 45, ekde 21 dec resp. neĉeesto EUR 60 plus eventuala kron-konto de la domo • Antaŭpaga pluso: transskribo al sekvoja IF •

Aliĝo

ekvalidas nur post ricevo de antaŭpago/kotizo (resp. post skriba konfirmo en kazo de subvencio/rabato)

min. antaŭpago: popers. EUR 45 (kotizoparto)

() partopreno: plentempe 27 dec ĝis 3 jan

() partopreno: de _____ ĝis _____
partatempa pago: 1 tagkompleto sen silvestra kombino 16 %
kun silv. kombino 16 % (6 kpl) - 22 % (1 kpl) - laŭ resp. kat.
• laŭdeziro komenco de la tagkompleto, ekz-e de mateno ĝis mateno

() plilongigo: + 1 tago, ĝis 4 jan 2006 matene

() alveno: trajne () aŭte ()

() mendo: vegetara manĝo
entute _____ personoj)

() mendo: tutaga ekskurso Luksemburgio
_____ x kompleta menu, _____ x infana menu
fakultativa pago samtempe/sutloke

() mendo: unuila ĉambro (*nur ĉe disponeblo*)
fakultativa pago samtempe/sutloke

() mondonaco IF-Fonduso _____ EUR
pago samtempe/sutloke

() prelego/kontribuo (*propozoj*)
pro IF-Fonduso rezigno pri honorario
(*detalaj letere*)

() IF-alĝilojn bonvolu sendi ankaŭ al
geamikoj/Konatoj (*adreso letere*)

() varbita de: / varbinto de: / deziroj:

rekomendinda por ĉiu vojaĝo (kaj necesa por vizo-petanto)
asekuro pri malsano kaj / aŭ akcidento

IF-anoj varbas geamikojn: vi kaj la novaj gastoj ricevas kroman rabatokuponon*

* nur personoj pli ol 25 jarojn aĝaj; vd. sub #RABATOLK (dato) (subskribo)

... cu kulpas malbona lingvo-instruado? ...

En artikolo ("*Calling for an overhaul of the teaching of English in Thai schools*") publikigita en la tajlanda anglalingva gazeto *The Nation*, la 28-an de aŭgusto, *Chatrarat Kaeumarakot* raportas:

Education

Minister *Chaturon Chaisang* said that most students' inability to communicate in English despite spending years learning the language pointed to a clear failure in language-teaching in Thailand.

[*Edukministro Chaturon Chaisang diris, ke la nekapablo anglalingve komuniki de la plimulto el la studentoj malgraŭ jaroj da lernado montras, ke klare fiaskas lingvo-instruado en Tajlando*]



Reagis Claude PIRON al tiu deklaro, per letero (anglalingve) al la gazeto. Li donas al ni tradukon esperantlingvan de tiu letero...

« Kiel multaj el liaj kolegoj en la tuta mondo, edukministro Chaturon Chaisang atribuas la malbonajn rezultojn de la tajlandaj studentoj en lernado de la angla lingvo al malsukcesa instruado.

Kiam registaroj rigardos fronte la realon?

La kaŭzo ne estas, ke la instruado estas fuŝa, sed ke instrui la anglan en lernejoj tiamaniere, ke la studentoj fine regu ĝin, simple estas neplenumbla tasko (escepte en landoj kun ĝermana lingvo).

La angla estas tro malfacila por la mezuma studento. Fakte, ĝi estas ege malbona elektaĵo por internacia komunikado. Ĝi estas plena je nekonsekvencaĵoj kaj absurdaĵoj, kiujn eblas memori nur per persista penado, senproportia kun la rezulto. Miriga estas la submetiĝemo de registaroj kaj landanaroj, kiuj akceptas la internacian uzon de la angla, kvazaŭ ĝi estus io fatala. La angla neniam estis demokratie elektita.

Delonge estas tempo, ke registaroj kundecidu objektivite studi la mondan lingvoproblemon kaj kompari la diversajn ekzistantajn metodojn ĝin superi, kun la celo elekti la plej bonan. Eblo inda je konsidero estas la internacia lingvo Esperanto. Ĝi funkcias tute bone kaj estas multoble pli facila ol la angla. Troviĝas Esperanto-parolantoj en multaj urboj de multaj landoj (Tajlando, Filipinoj kaj la arabaj landoj apartenas al la ĉefaj esceptoj).

Mi uzis Esperanton sur ĉiuj kontinentoj, kiam mi laboris por « Monda Organizo pri Sano », mi do povas atesti pri ĝia rimarkinda efikeco. Se en la tuta mondo registaroj kaj amaskomunikiloj instigus la loĝantojn lerni ĝin, la angla rapide eksvalidiĝus kaj studentoj tutmonde ĉesus investi sian nervan energion en la enmensigon de ĝiaj multaj absurdaĵoj, kiel la malsama prononco de "ough" en "tough", "though", "through", "cough"; la malsamaj strukturoj en "I am not" kaj "I do not know" (kial ne "I do not be" au "I know not"?), la fakto, ke vi ne povas derivi "dentist" el "tooth" (komparu kun la aliaj lingvoj: japana "tooth" = "ha" "dentisto" = "ha-iŝa"; indonezia "tooth" = "gigi" "dentisto" = "dokter gigi"; Eo "tooth" = "dento" "dentist" = "dentisto", kaj multaj, multaj aliaj.

La statuso de la angla kiel mondlingvo rezultas el inerteco. Estas tempo rekonsideri ĝin, esplori pri alternativaj solvoj kaj alpreni komunikilon, kies efikeco estu pli bone proporcia al la kostoj, kaj krome pli justa. Kial 6 elcentoj el la tera loĝantaro devu ĝui avantaĝon en ĉiu diskuto aŭ traktado simple pro tio, ke ili naskiĝis en la ĝusta lando? Kial ilia junularo povu dediĉi al teknika, scienca aŭ alia studado la tempon, kiun samaĝuloj alilandaj devas investi en la provon regi la absurdaĵojn de la angla lingvo, lingvo de malplimulto ?

Mi esperas, ke sana prudento foje venkos"...



... daŭre nelacigebla, nia samcelano aliflanke reagas -ankaŭ anglalingve- al aserto pli malpli "riskema", de iu "profetino" ...
Jen la teksto de tiu letero en esperanto, kiun li havigis al ni :

"Kara sinjorino Kramer

En ĉi-semajna "*Vim and Vinegar*" vi konkludis vian interesan artikolon pri la "*Granda Ega Bela Morgaŭo*" asertante: "*Kio ajn okazos, unu afero estas certa: neniam ĉiuj homoj de nia mondo kunvenos, kunigos la manojn kaj kantos kanton en Esperanto*".

Prave, neniam ĉiuj homoj kunigos la manojn kaj kantos en Esperanto. La funkcio de Esperanto neniam estis fariĝi la mondlingvo, nur servi kiel modesta peranto inter malsamlingvanoj. Mi parolis kaj parolas en Esperanto kun homoj el la plej ekzotaj landoj ek de kiam mi adoleskis (mi nun estas 74-jara), kaj mi ĉiam trovis tiun manieron komuniki pli plaĉa ol la anglan, lingvon, kiun mi ŝatas, sed kiun mi neniam regos sufiĉe por senti min egalnivela kun denaskulo. Mi esprimis min pli flue en Esperanto post ses monatoj ol angle post ses jaroj, kaj la facileco konstatabla dum lernado plu ekzistas je la momento esprimi sin : pro kialoj, kiuj rilatas al neŭropsikologio (vd ĉapitrojn 6 kaj 7 de mia libro "*Le défi des langues*", Parizo: L'Harmattan, 2-a eld. . 2001), en Esperanto vi malofte dubas, vi ne torturas vian cerbon serĉe al la ĝusta vorto, vi ne timas aperi ridinda, kiom en aliaj lingvoj.

Antaŭ du jaretoj, mi travojaĝis nian planedon serve al *Monda Organizo pri Sano*. Sur ĉiuj kontinentoj (kaj sur multaj insuloj, ekzemple en Japanio), mi diskutis en Esperanto kun lokanoj, kiuj ne scipovis la anglan. Mi do povas atesti pri ĝia elstara taŭgeco, kompare kun la angla aŭ kun sistemoj kiel samtempa interpretado.


Rimarkinda fakto, rilata al punkto, kiun vi pritraktas en via artikolo, estas, ke homoj restas multe pli si mem, kiam ili komunikas en Esperanto, ol en la angla. En la angla, ili penas imiti fremdan modelon. Kiam ili sukcesas, ili ne plu aspektas kiel si mem, ili aperas pseŭdo-anglo-saksaj, ili iel anstataŭigis sian identecon per alia, iom kiel personoj kun plurpersoneca perturbo. Kaj kiam ili malsukcesas. Nu, kiel korea kuracisto foje diris al mi: "Kiam vi parolas fremdan lingvon, vi sonas malpli inteligenta ol vi estas". En Esperanto, oni sentas ilian veran memon, ĉar la lingvo allasas multe pli da variado en prononcmankon, vortordo, gramatika uzado, referencoj, ktp. Dum la angla ofte aspektas kiel maskvestaĵo, kiu malbone sidas sur la fremdula korpo, Esperanto ĉiam restas perfekte adaptita al la persono kaj al ties devenloko.

Spite al la multaj lingvistoj, ĵurnalistoj kaj politikistoj, kiuj, malbone informite, disvastigas siajn antaŭjuĝojn -mi ne diras, ke iliaj intencoj ne estas puraj, nur ke ili ne imagas, ke ekzistas faktoj esplorindaj antaŭ ol esprimi sin publike pri la temo- Esperanto ne ĉesas progresi, ŝajne laŭ eksponenciala kurbo. Tial mi ne vetus favore al tio, kio, por vi, estas tiel evidente "certa". La kritika maso, kiu renversos la tendencon uzi la anglan mondlingve, alproksimiĝas. Finfine, homoj ne estas stultaj. Kiam metodo solvi problemon montriĝas pli efika, rilate al kosto, ol alia, montriĝas pli facile akirebla, pli justa al ĉiuj, kaj pli respekta al identecoj kaj kulturoj,

estas multaj ŝancoj, ke la plimulto fine alprenos ĝin. Homojn komence ne allogas tio, kio pli poste montriĝas progreso. Ili ĉiam komence forĵetas aŭ primokas la novajn elpensajojn, kiuj rezultas el homa kreemo kaj montriĝas facilaj kaj agrablaj. Pensu pri la t. n. arabaj ciferoj, au pri la metra sistemo. Sed fine ili agas laŭ siaj intereso. Mia noveleto "These Terrans are real masochists [Tiuoj teranoj estas veraj masohistoj]", TTT-e alirebla, provas humure pritrakti tiun homan tendencon. Vi trovos ĝin je <http://claudepiron.free.fr/> ; alklaku "Articles" en la maldekstra menuo, kaj iru al "En anglais".


Kiom koncernas Esperanto-kantadon, kanti en Esperanto estas io ofte spertata en la internaciaj eventoj, kiuj uzas tiun lingvon. Se vin interesas aŭskulti Eo-kantojn, provu <http://www.vinilkosmo.com>, la ĉefan produktiston de KD en la zamenhofa lingvo.

Kiel ajn estu, multan dankon pri tio, ke vi invitis nin resti kritikemaj rilate la manieron koncepti la ontan tempon.



Ĉion bonan al vi... "

...Pri kutima misinformo...



Laŭ informo de samideano *Emilio Cid*, la brazila revuo **VEJA** (1. 200. 000 ekzempleroj) publikigis, en la sekcio "leteroj" de unu el la lastaj numeroj, nur leteron de aŭtoro de libro pri la angla, kiu skribis, ke. . . « *Esperanto estas mortinta lingvo. . .* ».

Emilio petis, ke oni reagu. . . ***

Jen la propra reago de nia amiko kaj kunlaboranto Henri Masson ...

... ..

Monsieur le rédacteur en chef
de la revue VEJA

Depuis bientôt 118 ans, l'espéranto encaisse toutes sortes de coups: ça va des tentatives d'éradication par des régimes totalitaires jusqu'à la bête épaissie qui se manifeste parfois aussi dans certains médias. Certains affirment aujourd'hui encore que *l'espéranto est une langue morte*. Un de vos lecteurs, auteur d'un livre sur l'anglais, l'a fait récemment dans vos colonnes.

S'il est si peu honnête à l'égard de vos lecteurs au sujet de l'espéranto, comment le serait-il au sujet de l'anglais ? Le procédé est facile à deviner: *ternir l'image de l'espéranto pour que celle de l'anglais apparaisse brillante*; enterrer l'espéranto pour faire apparaître l'anglais comme la langue salvatrice, celle devant laquelle il faut se prosterner.

En dehors de toute subjectivité et de toute théorie, il est souhaitable que des journalistes de pays non anglophones, ou n'appartenant pas au G7 (ou G8) fassent les comptes: **combien ça coûte** en moyens humains et financiers au monde non anglophone (95,16% de l'humanité, par déduction, selon des statistiques de la CIA: <http://www.cia.gov/cia/publications/factbook/geos/xx.html>) de se soumettre devant l'anglais plutôt que de calculer les économies que permettrait l'adoption d'une langue neutre, aussi logique, riche et accessible que l'est l'espéranto ? Et il y a d'autres avantages qui ne valent pas moins que les économies: le gain de temps ("*times is money* ! "), le gain en qualité de communication. . .

L'espéranto ne doit pas être jugé sur la base du ouï-dire dépourvu de fondement. Ce que je trouve d'admirable dans l'espéranto, c'est son **extraordinaire vivacité, sa faculté de résistance**. Il est bien vivant, et ça n'a jamais été aussi facile de le vérifier qu'aujourd'hui grâce à Internet et au mot clé "esperanto". Aucun de ceux qui, voici plus de 100 ans, affirmaient que l'espéranto était une langue morte ne lui a survécu. Il aura 118 ans d'ici quelques mois, et ceux qui disent aujourd'hui la même chose ont de moins en moins de chances d'atteindre sa durée de vie.

Avec mes salutations les meilleures.

Henri Masson, coauteur, avec René Centassi, ancien rédacteur en chef de l'AFP, de "*L'homme qui a défié Babel*", paru simultanément en seconde édition avec la traduction en espéranto chez L'Harmattan, Paris, 2001.

A paraître en espagnol (juillet 2005), en coréen et en lituanien. Existe sur cassette pour les déficients visuels. espero.hm@wanadoo.fr Tel & Fax : + 33 02 51 31 48 50 <http://www.esperanto-sat.info>

*** NB de la redakcio de "La Informilo" – Evidentiĝas, ke ne plu „aktualas” ankaŭ reagi, pro la malfrua apero de ĉi-tiu numero. Ĝenerale rebatoj aŭ reagoj plenplene efikas, se ili postsekvas rapide la kritikendan dokumenton aŭ aserton...



... En direct du Québec... à propos de "week-end" ...

... Dominique Beaulieu écrit :

"Au Québec on utilise depuis toujours "fin de semaine" comme dans de nombreuses autres langues:

- fin de semana es : fin de semaine
- cap de setmana ca : fin de semaine
- fim de semana pt : fin de semaine
- wochenende de : fin de semaine
- week end en : fin de semaine
- shuu matsu (semaine-extrémité) jp : fin de semaine

... Bref y'a qu'en français de France qu'on emploie une tournure étrangère !!!" ...et de même, il n'y a qu'en français que pour arrêter n'importe quel programme d'ordinateur il faille le "quitter". Dans toutes les autres langues on "sort", on "ferme" on "arrête". Cela me désespère et fait que rarement j'emploie la version française des programmes même quand elle est disponible.

Essayez de demander à quelqu'un s'il veut «quitter de fumer». Bien entendu non, il vous dira qu'il a «arrêté». Mais en informatique c'est pas pareil, on «quitte» le programme. Et le pauvre n'a qu'à bien se tenir, il doit rester dans son coin du disque dur, pleurant d'avoir été si injustement abandonné. Ayez de la compassion pour les programmes, ne les quittez pas!"

NB - Notre ami et collaborateur de « La Informilo », Maurice SUJET tient à apporter sa contribution :

... "On peut ajouter qu'autrefois, disons avant la dernière guerre, celui qui ne travaillait pas le samedi et le dimanche faisait "la semaine anglaise".

En suédois le fameux "weekend" qui nous fait considérer par la presse et certains forums anglo-saxons comme de "féroces adversaires de la langue anglaise", car certains voudraient le remplacer par *fin de semaine*, est moins utilisé qu'en France : on utilise l'expression équivalente "vecko slut" ou même "helg".

Une simple consultation du site: www.esperanto.se/kiosko vous permettra la lecture de plus de 15 000 journaux du monde entier, en particulier de Suède, et vous pourrez constater que malgré la parenté des langues anglaise et suédoise il est fort rare de trouver dans les articles des mots spécifiquement anglais, lesquels hélas abondent de plus en plus dans notre presse nationale ou régionale où les "outing(s)" à propos de tout et de rien, les "burning(s) out", home jackings, car jackings, s'ajoutent aux relookings, stretchings, liftings, peelings et strippings aux auto selfwashings ou shampoingings de naguère ou aux dancings et aux parkings de jadis. Le comble n'est-il pas d'entendre de savants ignorants de la réalité nous faire la leçon en prétendant qu'il s'agit là d'un enrichissement bénéfique de la langue, à nous qui savons que le français a effectivement emprunté des mots à plus de 120 langues et dialectes (voir Henriette Walter), la règle étant le plus souvent d'emprunter des mots étrangers pour désigner des notions nouvelles (non pour remplacer des mots précis du français) en leur donnant si possible une prononciation et une orthographe françaises pour mieux s'intégrer. Chacun connaît "riding coat" devenu redingote pour n'en citer qu'un, bien typique.


Dans les rayons de mon village un produit anti-tiques s'appelle "DOG-NET STOP" (j'aurais pensé que ceci était un sifflet à ultra-sons), le produit anti-puces s'appelle pompeusement "FRONTLINE", le produit contre les piqûres de guêpes se nomme "GUÉP'AWAY" et contre les piqûres d'insectes "INSECT ECRAN", etc etc. Le ridicule dépasse toutes les bornes, et ...quand il n'y a plus de bornes il n'y a plus de limites! (Pierre Dac).

A tous ces mots qui rendent la lecture des journaux de plus en plus pénible je préfère les mots de mon briard-champenois natal, lesquels, hélas n'ont pas eu le privilège d'enrichir le français dans bien des domaines de la vie rurale que j'ai encore connue dans ma jeunesse.


"A la revoyure" et bon courage.

Maurice Sujet

Problemo... solvita !===== (vidu « enigmo »-n en La Informilo 130)



La filo kaj la filino uzas la ŝalupon (45 + 40 kg...). Nur la filino atendas sur la marbordo dum la filo reiras al la boato kaj elŝalupiĝas. La patrino kaj la hundo enŝalupiĝas... atingas la kontinenton kaj elŝalupiĝas. La filino, sola, reiras al la boato, kaptas la fraton... kaj ambaŭ atingas la kontinenton. Nur la filino forlasas la ŝalupon, dum la filo reatingas la boaton, elŝalupiĝas... La patro, sola, atingas la kontinenton... La filino enŝalupiĝas reiras al la boato, rekaptas la fraton... Ambaŭ kviete retrovas la gepatrojn... kaj la hundon!



MI RAPORTAS

Reklam-budo en Fontenoy-la-Joûte, la "vilago de la libroj"



Ankaŭ ĉi-somere Esperanto videblis centre de la vilaĝo, kiun kutime frekventas libroamanta klera publiko.

Ne amasis la vizitantoj, sed la interesiĝintoj estis tre scivolaj. Certe, oni ofte

aŭdis la eldiron: *jen Esperanto ankoraŭ vivas !* Sed kiel jam konstatite, kreskas nun la nombro de la virgaj nesciantoj, t.e. la gejunuloj, kaj tiu publiko ja nepre estas informinda.

Deĵoris ĉi-somere la lastan dimanĉon de junio, julio kaj aŭgusto, komplemente al la kerna duopo, Jacques HERLE kaj Jean-Luc THIBIAS: Gesinjoroj

GILBERT, Catherine ROUX, Micheline COLNOT, Gisèle BERTAPELLE, Liliane BERSWEILER kaj Edmond LUDWIG.

Necesas reliefigi la reklaman efikon de Sinjorino BERSWEILER, kiu senmanke interesis la vizitantojn per donacita peco da memfarita *Esperanto-kuko*. Post la frando la manĝintoj devis legi ties recepton en Esperanto. Venis la konstato, ke ili jam komprenas la plej grandan parton de la teksto, kaj tiel la intereso estis vekita. Povis sekvi demonstro fare de Jean-Luc THIBIAS kaj ties magia tabulo. Sur la foto sin trejnas en perkuka reklamado Sinjorino BERTAPELLE.

Sufiĉe belis la vetero kaj la etoso agrablis. Ek al la venonta somera sezono !

Edmond LUDWIG

Poezio kaj muziko de la mondo... en Nilvange (57)



Esperanto -Thionville kaj *Forumo de la Civitanoj* organizis koncerton de **Kajto** la 11an de aprilo 2005 en la domo "Albert Camus" de Nilvange.

Kajto estas kvaropa muzikgrupo, famkonata en Esperantujo, el nordo de Nederlando, pli specife el Frislando, kiu kantas en Esperanto. Ĝia repertuaro konsistas el melodioj influataj de folkloro, kun tekstoj originale verkita de poetoj el diversaj landoj de la tuta mondo. La grupo uzas plurajn instrumentojn, kiel gitaron, mandolinon, bangon, violonon, akordionon, flutojn, citron kaj buŝharmonikon. Ĉefe la temo estis pri trajnoj laŭ ĉiuj aspektoj... Vaportrajnoj, trajnvojaĝado, fajfado kiel trajno, stacidomaj haloj, vagabondaj muzikistoj. Ili imitis ĉiujn facetojn de tiu mondo : la vibranta metalo kiel la knaroj ! Ili jam publike

ludis en diversaj landoj, de Pollando ĝis Kanadio...

Ĉeestis en Nilvange 50 personoj, el kiuj pli ol 20 esperantistoj el Thionville, Metz, Nancy kaj Luksemburgo. Kelkaj "batalantoj" por savi la gimnazion de Nilvange enpartoprenis kaj malfermis trinkejon, kies profito estis por la "lukto"

Kajto varmigis la salonon dum 1h30 kaj kantigis la homojn ! Vere ili plezurigis la publikon, kiu multe aplaŭdis la grupon... Eĉ al la infanoj tiu muziko plaĉis. La kvaropo vendis kelkajn CD-romojn, eĉ al ne esperantistoj. La evento estis tiel memorebla kiel la koncerto de *Mikaelo Bronŝtej* okazinta en novembro en Nilvange (vidu la antaŭan "La Informilo-n").

Du artikoloj aperis en la regiona gazeto "Le Républicain Lorrain", [*Lorena Republikano*]. La loka perkabla televidilo de SIVOM, kiu elsendas en Nilvange kaj najbaraj urbetoj raportis la eventon dum 3 minutoj ĉiutage dum kelkaj tagoj. Por anonci la spektaklon ni ŝovis 2500 informilojn pri Esperanto kaj **Kajto** en la leterkestojn de la loĝantoj. Helpis esperantistoj kaj "batalantoj" por savi la gimnazion.

<http://www.esperanto-thionville.fr.st> Bruno HENRY

Nia aŭtoro, *Oleg Izjumenko*, revenis el la IJK en Zakopane kun renovigita entuziasmo. Kortuŝa estis por li la parolado de *Etsuo Miyoshi*, kiu rakontis pri sia vivo kaj renkontiĝo kun Esperanto. Ĝojiga kaj eĉ miriga estis por li la ĉiam pli videbla rolo de la retprojekto *lernu.net* en la estigo de novaj generacioj de esperantistoj.

« Kvankam mi partoprenis mian unuan IJK pasintjare en *Kovrov* (Rusio), la ĉi-jara kongreso estis kvazaŭ mia unua IJK, ĉar mi sentis multe pli da internacieco tie ol en Rusio (nu ja, ĉar mi estas ruso). Tamen rusoj jam la trian sinsekvajn jaron estis la plej multnombra (85 personoj) nacia grupo de partoprenantoj, ĉi-jare kvante superinte francojn kaj polojn.

Kompare kun la pasintjara IJK tiu ĉi estis pli internacia, dank' al la partopreno de japanoj, vjetnamoj, koreoj, afrikanoj kaj nepalanoj. Tiuj lastaj povis veni nur pro granda helpo de TEJO pri akirado de polaj vizoj - ĝenerale estas tre malfacile ricevi eŭropan vizon por civitanoj de Nepalo. Koreoj multe lobiis por IJK-2007 en Busan (Koreio), oni foje eĉ havis impreson, ke la afero pri la elekto de la kongres-urbo jam estas definitive decidita.

Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) iĝis landa sekcio de TEJO - tio estis decidita dum unu el la komitat-kunsidoj de TEJO. Alia grava rezulto de tiuj kunsidoj estis elekto de la nova estraro de TEJO, pri kio *Libera Folio* jam informis. Sendube ĝojigis min la



enposteniĝo de mia samklubano kaj eks-samurbano *Valentina Sidorova*, kaj la estraraniĝo de aliaj miaj amikoj. Mi konas iliajn kapablojn, kaj kredas je bona laborpovo de la nova estraro - sukcesojn al ili!

Unu el la plej interesaj por mi prelegoj estis tiu de deputito de la **Eŭropa Parlamento** *Małgorzata Handzlik*, kiu iom skize rakontis pri parlamentaj strukturoj en la **Eŭropa Unio** kaj -pli detale- pri la lingva situacio en la Eŭropa Parlamento kaj sia elstara (laŭ mia pritakso) agado por Esperanto tie.

Alia tre inspira, emocia kaj kortuŝa estis la elpaŝo de s-ro *Etsuo Miyoshi*, kiu rakontis pri sia vivo ekde juna aĝo ĝis nun, pri problemoj rilataj al persona kuraĝo, komerco kaj interkompreniĝo kun alilandanoj. Granda parto de lia prelego estis dediĉita al Esperanto: kiel s-ro Miyoshi renkontis ĉi tiun lingvon, kiel eklernis kaj lernadis ĝin, kiel li agas por antaŭenigi ĝin en Eŭropo. Eĉ por mi, aganto por Esperanto dum pluraj jaroj, tiu ĉi sincera kaj persona "konfeso" donis novan inspiron kaj deziron eĉ pli intense agi por la disvastigo de nia lingvo.

Mi kore ĝojis kaj iom miretis pri la grava rolo, kiun nun ludas la ret-projekto lernu.net en la medio de junaj esperantistoj: ŝajnis ke preskaŭ ĉiuj konas ĝin kaj multaj eklernis Esperanton per ĝi kaj uzas ĝin por perfektigi sian lingvo-posedon kaj interkomuniki kun siaj amikoj el la tuta mondo. Antaŭ kvar jaroj, kiam E@I estis nur formiĝanta, oni malfacile povus imagi tian grandan sukceson de ĝiaj projektoj.

Alia kunlaboraĵo inter E@I, TEJO kaj ILEI estis seminario por junaj instruistoj de Esperanto "*Flugiloj de malfacila vento*", dividita je gramatika kaj metodika partoj. Mi ĉeestis neniujn el ili, do ne povas priskribi la seminarion. Tamen okulfrapis tute profesie faritaj manlibroj por estontaj (kaj jamaj perfektigemaj) instruistoj de Esperanto, kiuj estis reverkitaj speciale por la kongresa seminario. Ili estis aĉeteblaj en la kongresa libroservo kaj baldaŭ estos mendeblaj ĉe grandaj libroservoj (unue ĉe tiu de UEA). Mi rekomendas!

Mi devas diri, ke mi revenis de la kongreso kun renoviĝinta entuziasmo por agi por kaj per Esperanto (interalie mi entreprenos ankoraŭ unu provon rete kunigi junajn ekologiemaĵajn esperantistojn kaj eble nia neformala reta asocio sukcesos "pliverdigi" la venontjaran Internacian Junularan Kongreson, kiu okazos en **Sarajevo**). Espereble estis same por la aliaj partoprenintoj! ».

Oleg Izjumenko oleg@ikso.net
el *La Ondo de Esperanto*

Junulara kongreso sen miss-oj ...



La Loka Kongresa Komitato de la ĉi-jara **Internacia Junulara Kongreso** en Zakopane decidis revivigi malnovan tradicion kaj okazigi belec-konkurson sub la titolo "*Miss Esperantio*". Lastfoje tia konkurso okazis en IJK en Debrecen, Hungario, en 1983. Jam printempe respondeculoj de UEA klopodis konvinki la organizantojn rezigni pri la ideo, sed vane. Tamen, ja efikis protestoj de kongresanoj en Zakopane. Ankaŭ la bando *Esperanto Desperado* protestis kontraŭ la planita konkurso dum sia koncerto en Zakopane.

La Internacian Junularan Kongreson en Zakopane malfermis salutvortoj de la pola prezidento. En la programo estis parolado de eŭropa parlamentano, fama japana mecenato kaj pintaj bandoj. Tamen la plej preparolata programero estis la konkurso pri la plej bela kongresanino... kvankam ĝi ne okazis... !

Jen kiel la organizantoj de la IJK prezentis la konkurson:

" Ĉu vi estas bela? Ĉu vi estas knabino? Ĉu vi estas Esperantistino? Ĉu vi ĉeestos IJK-on? Tiukaze do ĝuste vi devas aliĝi al la konkurso "*Miss Esperantio*", kies celo estas elekti *La plej belulin'* de IJK. Kion vi povas atendi? Nu - kiel kutime: mallonga sinprezento, promenado en vespera robo, libera disciplino = dancado, kantado, poem-deklamado... Aliĝu jam nun por la konkurso (valoraj premioj jam atendas!)".

La organizantoj ŝajne komprenis, ke ne ĉiuj aprezas belec-konkursojn, kaj aldonis apartan klarigon "por feministoj":

... Organizantoj ne celas malestimi inan sekson - tute male, ili per la okazaĵo volas kliniĝi antaŭ virinaj beleco, ĉarmo, kapableco, multflankeco (...) - kaj elekti "la plej" knabinon de Esperantio (malgraŭ konscio, ke ĉiu Esperantistino estas la plej...).

Eble surprize por la organizantoj, ne nur reprezentantoj de la plenkreskula movado, sed ankaŭ tre multaj partoprenantoj de la IJK opiniis la ideon de belec-konkurso neaprobinda. Estis laŭtaj protestoj, kaj fine la jam anoncita konkurso estis nuligita. "...Pri tio mi persone ege ĝojas! La ideo organizi tiun konkurson dekomence estis fia..." opinias la rusa kongresinto Oleg Izjumenko. Laŭ li, la cetera programo de la IJK estis tre bona, sed la planita konkurso estis tute neakceptebla.

... Tiaj konkursoj, pro tio ke ili fondiĝas sur patriarkiaj stereotipoj, malaltigas la rolon de virino, eliminis ŝian dignon, kaj degenerigas kaj la partoprenantojn kaj la spektantojn. Tial mi estis kaj daŭre estas kontraŭ ajnaj "beleco-konkursoj". Ja eblas konkuri en aliaj kampoj, kiuj estas ne malpli gravaj ol fizika allogeco, kaj ja ankaŭ viroj povas partopreni diversajn konkursojn kune kun virinoj, tiel ne substrekante nur unu sekson aŭ gravecon de nur unu trajto (nome de fizika aspekto) de tiu sekso..." opinias Oleg Izjumenko.

Kim Henriksen de *Esperanto Desperado* same ĝojas, ke la konkurso estis nuligita.

"Mi parolis kurte kun Vera de la LKK, laŭ ŝi oni rezignis pri la konkurso pro tro da protestoj de okcidentuloj... Cetere mi mem, dum nia koncerto de *Esperanto Desperado*, parolis kontraŭ la konkurso. Kiam ni kantis "Aline" ni ja en la fino kantas, ke ĉiuj estas belaj (vi povas aŭdi ĝin sur la unua kasedo de *Amplifiki* "Tute ne gravas").

...Tio fakte memorigis al mi kial ni havis tiun finon de "Aline". Ĝi estis verkita dum la IJK en Debrecen en 1983, kiam mi lastfoje spertis, ke oni aranĝis tian konkurson. Tiufoje ni fakte eĉ klopodis ridindigi ĝin en tiu maniero, ke ni estis pluraj viroj, kiuj lasis inoj aligi nin en siaj nomoj, kaj poste ni venis vestite kiel inoj. Sed la aranĝantoj kaptis nian intencon kaj lasis nin promeni unue, kaj poste daŭrigis la konkurson..."

PS - La vinjeton aldonis « La Informilo »

ĉerpita el « Libera Folio »

... jen kelkaj kongres-spikoj ...

Bonan Tagon, Amiko

ESPERANTO OPENS THE DOOR

La flugagentejo **Lithuanian Airlines** ne nur proponis favoran tarifon al siaj gastoj, partoprenantoj de la

UK, sed pli neatendite ŝovis en la luksan, kutiman magazinon disponigitan al ĉiu pasaĝero, trafan kvinpaĝan artikolon -anglalingve tamen- pri la tutmonda evento, kaj pri Esperanto ĝenerale.

Bonveniga surprizo ĉe la Vilno-flughaveno: trejnita skipo deĵoras en la granda halo por akcepti la alvenantojn kaj doni al eventuala petanto ĉiujn necesajn informojn pri la kongresejo kaj la tranoktejo... Gratulon!

Bonega ideo nia, tiu anticipa rezervo de lu-prenota aŭtomobilo ĉe la firmao *Rent-Car* (senpaga reklamo!) ... Freŝbakita, ruĝa „*Fiat Punto*” atendas nin surloke! Ĝi eksterordinare faciligos kaj komfortigos nian restadon dum du semajnoj. Tuja „bona ago”: ni veturigos -... „ŝi” stiros...- ĝis *Reval Hotel*, Doktoron X, blinda, kiu entuziasme babilas pri siaj spertoj de esperantofono. Sidas kiel ĉicerono sur la antaŭa gast-seĝo, juna litovano. Sekve ni senprobleme atingos la kongres-centron.

Menciindas la etoso de nia propra tutmoderna hotelo, tute proksima de la flughaveno. Pluso: deĵorantino parolas la germanan. Sekve ni ne spertos



komunik-malfacilaĵojn! Ĉu aludi la gigantan, matenan „bufedon”... kiu fojfoje ŝparigis al ni la postan bezonon... „tag-manĝi”!

Miras ĉiu kongresan(in)o, malkovrante en sia abunda kongres-dokumentaro, du luksajn gvidlibrojn pri la ĉefurbo kaj pri la proksima urbeto *Trakai*! 216 belege ilustritaj paĝoj de la unua ne nur plej interesige konigas la historion de Vilnius sed ankaŭ igos nepardonebla, turiston, kiu perdiĝus en la urbo aŭ mistrafus vidindaĵon. Jen du verkoj, kiujn oni tutcerte trafolumos hejme, por ne tro bedaŭri la „forgesitaĵojn”...

Sed jen tuj ĉagreniga novaĵo: nia agema, nelacigebla amiko André G., apenaŭ ĵus alveninta, spertis aĉan travivaĵon okaze de unua vizito en la urbo... Misaŝo neoportuna, en ĉirkaŭaĵo de la katedralo, okazigis al li krurorompon kaj postulis rapidan enklinikiĝon por operacio... Tiu fuŝaĵo plej doloriga senigis lin je la tuta „kongreso” kaj necesigis reflugon hejmen... post kelkaj tagoj. Ni deziras al André, rapidan resaniĝon kaj baldaŭan renkonton en venonta esperanto-evento!

Nu, ni okulumu en la kongresejo mem. Temas pri „re-modernigita” kvinstela hotelo, iam uzita de la rusa agentejo „*Intourist*”. Multnombraj, zorge disponigitaj salonoj, en kiuj „fluos” kaj „elfluos” scivolemuloj pri kulturo aŭ pri malstreĉiĝo. Ni ne kaŝu, ke kelkaj riveliĝos tro malgrandaj. Kio?... Jes, spite al racia plano de la salon-aro, mankis sageto diskrete videbla, cele lokigon de ... necesejo! Feliĉe, ia flustrita konfidenco „*de buŝo al orelo*” solvis la problemon por la nov-alvenant(in)oj!...

Ĉu eta malsatiĝo? Akurataj, fak-gastigantoj ofertas bongustan kuketon kaj kafon aŭ teon, laŭ modera prezo. Nu, pro tro bona reguligo de la biologia horloĝo, necesas ofte pacience vicumi... Por pli postulema stomako, indas vizito de iu „*Double Café*”, ĉe la alia flanko de la avenuo, en „okcidenta”, tut-moderna, pluretaĝa komerc-areo. Tie eblis konatiĝi kun la loka kuir-arto, sed ĉefe frandi -o jes!- mirindajn desertojn!...

Ampleksa kongres-programo ellaborita de la LKK kompreneble ankaŭ satigas menson... Kompatinda kongresan(in)o! Ĉiuhore, deviga, doloriga decido, krom se oni estas „ĉies-estanto”! Konfeseme, mi iĝis pli turisto ol preleg-ŝatanto. Amuzis min (?) sesio de la „Akademio”... Ĉiuj membroj sidis unu apud la alia..., fronte al la aŭskultantoj, elvokante ian juĝantaron en tribunalo! Certagrade tedis min tiu kunveno, dum kiu, je la komenco, la sekretario Brian avertis nin, ke la nura vorto „propono” naskas ian „alergion” ĉe la moŝtaj membroj. Fakte, kelkaj proponoj redaktitaj sur paper-slipe kaj silente alportitaj al la responsulo perpleksigis min.

La „Terminologia Forumo” iĝis almenaŭ por mi pli interesiga, kvankam tro da monotonaj raportoj, eĉ foje legataj, certagrade enuigis. Ekz., dediĉo de longa momento al prezento de „trik-terminaro” riveligis miaopinie pura anekdoto!

Mi ne povas ne aludi la trejnadon de la internacia koruso, kiu rememorigas al mi saman eventon, kiun mi travivis en la UK de Augsburg. Ĉi-tie, plenŝtopita salono kun volontuloj sidantaj -ĉu tiel oni kapablas poluri kantojn?- malkuraĝigis min revivi la iaman ĝuon. Kompense, siaflanke, „ŝi” plenumis la mision, kaj mi konfesas, ke la koruso meritis la varman aplaŭdon okaze de la du prezentoj antaŭ la tuta kongresanaro...

Kara legant(in)o, jen kelkaj senprotokolaj spikoj de mia kongres-rikolto... Multaj ja restis sur la kampo sed nia „*La Informilo*” protestus pro tro abunda materialo!

En la venonta bulteno, mi invitas vin al eventuala kunvagabondo tra la urbo... -kun fotoj!-, kaj tra la tri landoj! Jes, la specifa registrilo de nia „*Fiat Punt*” indikis 2500 k-ojn fine de nia „aventuro”!

Kandido



FELIĈA SEMAJNO EN KASTELO ...



Ni (mia edzino kaj nia pli juna filo) aliĝis fine 2004 al la *Universala Kongreso 2005* en *Vilno*. Sed pro gravaj familiaj kialoj ni devis nuligi nian partoprenon. Ni organizis nenion alian por la ferioj. Tamen ni pasis bonajn feriojn.

Mi fakte, preskaŭ sekrete, revis pri ebleco partopreni je someraj esperantaj kursoj. Mi rigardis ĉe la reto la programojn de diversaj kulturcentroj de Esperanto kaj de *Kulturdomo - Kastelo de Grezijono* <http://www.gresillon.org/>. Mi presis la programojn, rigardis la mapon, kalkulis la kilometrojn, pripensis diversajn eblecojn por ligi kursopartoprenon kaj familiajn feriojn, kiel ni faris lastan jaron en *Pluzek*. Sed mi pensis, ke verŝajne mia revo ne povos ebligi, ĉar mi jam prenis feriojn sen mia edzino por la *Kongreso de Bulono ĉe Maro* en marto !

Do ni finis la laboron en nia oficejo la 22-an de julio sen scii kiel okupi la feriojn. Ni povis foriri sed ne tro malproksime por resti disponebla por mia aĝa patrino. Kiel kaj kion fari ? Mia edzino proponis al mi : “*Vi certe trovos, aŭ jam trovis solvon por ĉeesti staĝon aŭ alian aktivecon pri Esperanto. Mi havas tro da laboro en la domo kaj mi povos zorgi sola pri bopatrino. Prenu do la unuan semajnon da ferioj por aranĝi ion sola pri Esperanto. Poste ni havas ankoraŭ tri semajnojn par ferii kune.*” Brava edzino !

Kompreneble mi ne flanke lasis tiun edzinpermeson... Ekde sabate matene, la 23-an, mi telefonis al la Kastelo de Grezijono por demandi, ĉu mi povas ankoraŭ aliĝi la staĝon de unu semajno, kiu komencos vespere mem. Sed, kaŭze de la longo vojo (750 kilometroj) mi eble estos malakurata. Agrabla kaj simpatia voĉo diris al mi, ke ne problemas, mi povas veni kaj ke oni gardos al mi mian vespermanĝon !. Post agrabla veturilvojaĝo, mi preskaŭ alvenis akurate en lokon, kiu tuj ŝajnis al mi favora por studi Esperanton. Mia revo komencis esti realo...

Francine bonvenigas min per bela rideto kaj efika proceduro de registrado. Ŝi kunordigis la skipon, kiu bonege mastras la semajnon. Ŝi restis bonhumora, atentema kaj serena dum ĉiuj longaj tagoj de la semajno. Ŝi trovis respondojn kaj solvojn je ĉiuj problemoj kaj ankoraŭ tempon por la kafejoserivo. La aliaj personoj de la skipo : kuiristino, gardisto de kastelo kaj de la kampadejo, libroservobibliotekisto, instruistoj kaj kelkaj helpantoj sindoneme plenumis sian servon por la bona etoso kaj disvolviĝo de la semajno.

Post instalado ni komencis per kunveno de proksimume 25 personoj (deĵorantoj kaj instruistoj entenataj) por prezentado (oni provis memori la propran nomon de ĉiu) kaj por ricevi informojn, konsilojn, programojn, eblecojn, ktp., ĉio por komfortigi la partoprenantojn. Ĉiu estis en ordo por la morgaŭo : t.e. komenci la kursojn en tri grupoj (1a, 2a kaj 3a gradoj) en bela bieno de 18 hektarojn.



Mi decidis partopreni en la kursoj pri preparado al *Kapableco*. Post la akcepta kunveno, kiam mi estis sola en mia ĉambro, mi pensis, ke eble mi eraris aliĝi al la pli altnivela kurso ĉar, unue la tri aliaj partoprenantinoj de tiu grupo ŝajnas pli bone regi Esperanton ol mi, due mi sentis nia instruisto, Jean-Luc Tortel, kiel spertega pri Esperanto, trie mi ankoraŭ ne trapasis la duagradan ekzamenon, kaj kvare, malgraŭ ke mi bone komprenas kaj legas la lingvon, mi ankoraŭ ne parolas ĝin flue pro manko je okazoj praktiki. Mi do timis ĝeni la grupon pro mia nesufiĉa nivelo. Mi pensis simple dum aŭ post la unua tago peti, ke finfine pro mia neadekvata nivelo, oni lasu min aliĝi al la kursoj de la dua grado. Ĉe alia flanko mi pensis, ke mi venis por prepari la *kapablecon* sed mi havas la tempon. La temo estas preparado sen diri en kiom da tempo devas veni la ekzamentrapaso, ĉu ne ?

Jean-Luc Tortel komencis sian altnivelan kaj intereseigan kurson per tiuj vortoj : « oni rajtas erari » kaj per tiu konsilo « faru de *Esperanto* vian propran aferon ». Dum la tuta semajno mi neniam enuis. Mi ne gardas tre bonan memoron pri miaj knabaj kaj junulaj lernejoj. Sed la kurson de Jean-Luc Tortel mi sekvis frandeme, religie, mi neniam laciĝis. Oni sentas sin deveni inteligenta nur kiam oni auskultis lin. Lia kurso estis diversspeca, li ofte ŝanĝis temon kaj spicis per spiritaĵoj de Raymond Schwartz aŭ de aliuoj por gardi nian atenton.



La akuzativo fariĝis feliĉo, la refleksivo poezio ! Ni promenis tra la tuta esperanta gramatiko kiel en bela ĝardeno, malkovrante tie subtilecon, tie belajon au mirigaĵon kaj mem kontraŭknaĵojn aŭ ŝercajn sonalternojn. Ni trairis la historion de la lingvo kaj de la movado : Ido krizo, la Fundamento, la revuo « *La Esperantisto* » la unua, presita en Nuremberg kaj pagita de Trompeter, kiu estis kampomezuristo, ktp. Jean-Luc Tortel vizitigis al ni la pionirojn de Esperanto (Zamenhof, Grabowski, Emile Javal, Sebert, Privat, De Beaufront, Couturat, Lemaire, René de Saussure, Cseh, ktp.) kaj la eminentulojn (Ivo Lapenna, André Albault, Raymond Schwartz, ktp.) de la movado.



Ni vojaĝis tra esperanta literaturo de Zamenhof, ĝis hodiaŭ. Ni ricevis konsilojn kaj rekomendojn pri la verkistoj, kiujn ni devas legi : Schwartz, Waringhien, Boulton, Auld, Grabowski, Kalocasay, Privat, Kabe, kaj pri la libroj, kiujn oni devis studi por prepari la *kapablecon*. Ni laboris pri tradukarto. Jean-Luc Tortel povas evidente bone instrui pri tiu temo, ĉar li tradukis el la itala la libron « *Senso* » de Camilo Boito kaj el la okcitano la libron « *La Besto de Vakareso* » de Joseph d'Arbaud. Ekde mi legis tiujn librojn kaj ŝatis ilin.



Kiam mi relegis miajn notojn de tiu staĝo por skribi tiun artikolon, mi estas mirigita pri la riĉeco kaj la granda kvanto da temoj, kiujn ni vidis dum tiu semajno. Mi amas ankoraŭ pli Esperanton dank'al Jean-Luc Tortel. Li estas ne nur kultur-oceano pri Esperanto sed ankoraŭ pri multaj aliaj lingvoj kaj aferoj. Mi ŝatis ankaŭ lian grandan saĝecon.




Ni ne nur vizitadis la kurson, sed oni proponis al ni diversajn akvitecojn : vizito de la urbo *Baugé*, interesa malkovro de « *la boule de fort* » (globo de forto), kiu estas regiona ludo kiel la ŝet-globoludo, ŝatinda demonstro de baroka fluto de partoprenanto en la kurso, konferenco pri la katolika pastro *Emile Peltier*, (1870-1909) pioniro de Esperanto ĉe la katolikoj, kiu kreis la revuon *Espero Katolika* kaj diris la unuan meson en esperanto, kunveno pri la historio de la Kastelo de Grezijono, librovespero, ktp.

La Kastelo de Grezijono estas bela loko, kiun mi ŝatis kaj kie mi estis feliĉa. Mi kore dankas ĉiujn personojn kiuj laboris/as por konservi tiun kastelon en la movado kaj por organizi la kursojn. Mi komprenas la malfacilaĵojn, sed povas nur diri, ke mi pasis vere agrablan semajnon en Grezijono. Mi ŝatis la bonan etoson. Mi multe ricevis. Dankon al ĉiuj. Dankon al Esperanto !...

Bernard BEHRA



Elisabeth, Marie-Lucie MASALA ĝojigas la feliĉan gepatrojn Bruno kaj Anne, lokiginte en la hejmon la 25an de aŭgusto ! Ŝi invitas la amikojn de "manjo" kaj "paĉjo" ĉeesti la bapto-ceremonion, kiu okazos la 25an de oktobro en la preĝejo Sankta Tereza en METZ... Oni kantos en esperanto ! Gratulon al la nova triopo ! amb@osiek.org



Pro bedaŭrinda malapero de la fak-bulteno "La Domo", "La Informilo" plezure aperigas 2 paĝojn, kiujn ĵus sendis niaj agemaj geamikoj Emmanuel kaj Florence Desbrières.

Bone memoras niaj legantoj pri tiu juna paro, al kiu ni ŝuldis siatempe viglan Eo-kurson en Epinal. Ili ambaŭ organizis ankaŭ la semajnfinan renkontiĝon de Hennezel (2003).

Ni konstruis el pajlo ... kun esperantistaj helpantoj !

- Ni simple revis bone vivi sen detruo la naturon.
- Nun, Solène nia filineto estas preskaŭ tri jaraĝa, kaj ŝi vivas meze de la naturo. Ŝi kolektas herbaĵajn florojn por donaci al sia panjo. Ŝi trinkas ĉiumatene lakton el la bovinoj de la bredistoj de la vilaĝo, kiuj ne uzas kemiaĵojn. Ŝi donas panerojn al la kantantaj birdetoj de la ĝardeno. Ŝi adoptis ŝafinon kaj ŝian ŝafidon por tondi la herbojn senbruego ... kotopo...
- Dum niaj junaj jaroj, ni serĉis praktikajn ideojn, kaj ŝparis monon. Ni finfine trovis bieneton ĉe kampara vilaĝeto sur la unua altebenaĵo de la franca Ĵuraso. La tereno estis paŝtejo (5 500 kvadrataj metroj) kun arbara heĝo norde. Ĝi estas eta deklivo kiu rigardas sude.
- Poste, ni serĉis konstruadon teknikon kaj iun tagon, danke al amikino, ni ekkonatiĝis kun la paro KOVARIK. Ni vizitis ilian pajlan domon kaj tuj la etoso plaĉis nin ambaŭ. Ni kontaktis profesiulojn. La ĉefa estas Gilles MOREL, la ĉarpentisto, kiu desegnis la planojn.
- Samtempe ni alvokis geamikojn kaj la esperantistojn, eĉ en la informilo de TAKE. Fakte partoprenis multe da geamikoj. La duono estas esperantistoj. Tiel, oni vidis esperantisto el Pollando segi kun Alain DROYER, esperantisto el Dijon (Francio). Dum unu semajno, Algis, esperantisto el Litovio muntis muron el pajlaj pakegoj kun Franca neesperantisto. Partoprenis ankaŭ Bruno Flochon, Violette Walter, Philippe Rieunau, Ginette Martin, ktp ...

Konstrui el pajlo ?... Kial do ?

Ĉefaj avantaĝoj: bonega kaj natura ŝparhejtaĵo el regiona materialo: la domo estas varma vintre kaj freŝa somere. Due, la muroj el pajlo nature kontrolas la humidecon en la domo.

La ĉefa risko: akvo!

Finfine, pakegoj el pajlo ne tro timas fajron ! Ili estas tre premitaj: provu ekbruligi telefonjarlibron por vidi :-). Multe pluvis la pasintan someron: ni vidis putri pakegoj el pajlo, kiuj restis ekstere.

Nepre, la domoj el pajlo devas havi „bonajn ŝuojn kaj bonan ĉapon". Tio signifas, ke la bazo de domo estas pli alta ol la grundo, kaj ke la tegmento iras fore el la muroj.

Ideale la okcidenta kaj suda fasadoj, kiuj regule ricevas pluvon estas bone protektitaj per longaj tegmentoj.

Aliaĵoj

- Sunkaptiloj por varmigi hejman akvon... Tre bone funkcias, ni preskaŭ neniam uzas gason, la suno sufiĉas !
- Dankal' al hejtilo el specialaj ŝtonoj de Finnlando ni bruligis nur 7 kubaj metroj el ligno !
- Ni konstruis keleron el pajlo ĉe la norda fasado. Ni instalas enen la fridujon... Kaj duonjare, ne plu bezonas elektron por fridi !

Pliaj informoj eĉ vizitoj aŭ tranoktadoj :
Emmanuel kaj Florence DESBRIÈRES

« La Flava Domo »

5, Chemin de Salins

FR-39 800 BESAIN


Manuogflo ĉe yahoo.fr



1-armaturo el lignaj tabuletoj.




4- Algis kaj Jean-Mô sukcesis ...



2- la unua pagego ...




5- Ili ŝmiris el kalko !



3- Violette kaj Florence.



6- Unua vintro ...



KALEJDO SKOPO



INTERNACIA FESTIVALO pri foto-arto



bestoj
natura



nepre
vizitinda!

18/19/20-ajn de novembro 2005


MONTIER-en-DER (FR 52)

elstara gasto :

Hubert REEVES

esperanto-budo !

... el la kuirlibro de avinjo Odette ...



Krena fumita skapol-viando (ŝultro)

Vi bezonas 1,200 kg da skapolviando (porka ŝultro) fumita

Spic-buljonon farita per 4 karotoj, malgranda cepo, petroselo, poreo

Varma krena saùco

200 g da maldika raspita kreno

1 poteto (150 g) da freŝa kremo

Iomete da bona buljono, salo, duono de sukerpeco, muskato.

Kuiru malrapide la skrapolviandon en buljono dum 1h30. Se al vi mankas buljono, elkuiru la ŝultron en malvarma akvo

- poste elgutigu ĝin kaj tranĉe detalu.

- servu ĝin varmega, ĉirkaŭita de terpomo-salato, aŭ terpomoj kuiritaj en « kampo-robo » (kun la ŝelo...), senŝeligu ilin ! Vinagraj cepetoj, kukumetoj

En saùcujo *prezentu* varman krenan saùcon tiel preparitan :

- faru brunajon per butero kaj faruno.

- malseku ĝin per la buljono.

- aldonu la maldikan raspitan krenon, bone miksu, enkorpigu iomete da buljono se necese, tiel kiel pinto da salo... La kreno devas iomete ŝveliĝi. Lasu kuiri per milda fajro dum 25 minutoj.

- ligu la tuton per freŝa kremo, aldonu raspitan muskaton kaj servu la saùcon kune kun la skrapolviando.

Se la saùco ne estas sufiĉe spicita, aldonu flueton da vinagro.

La « schiefala » skrapolviando je kreno estas tipe alta, rejna recepto. Ĝi povas ankaŭ esti servita akompanita de verda salato aŭ esti kuirita en saŭkraŭto.


Bonan apetiton !...

actualiser	reload	refreŝigi
adresse	adress	adreso
analogique	analog	analoga
annuaire	adress book	adresaro
annuler	cancel	rezignu
antivirus	anti-virus software	senvirusigilo
arobace	snail, commercial at	heliko, volvita a
ascenseur, barre de défilement	scroll bar	rulumskalo
bannière	banner	reklamaĵo
barre de menu	menu bar	menuzono
barre de tâches	task bar	taskostrio
barre d'espace	space bar	spacetklavo
barre d'outils	tool bar	ilobreto
base de donnée	database	datumbazo
baud	baud	baŭdo
bit	bite	bito
bogue	bug	cimo
boîte aux lettres	mail box	leterkesto
bouton	button	butono
brancher	connect	konekti
navigateur	browser	foliumilo, krozilo, TTT-legilo, retumilo
bureau	desktop	labortablo
byte	octet	bajto, bitoko
cadre	frame	framo
capture d'écran	screen dump	ekrankopio
caractère typographique	type	tipo
CD-rom	CD-rom	kompakta Disko, laserdisto, CD-romo
champ	field	kampo
chercher	search	serĉi
clavier	keyboard	klavaro
cliquer	clic	klaki
coller	paste	elpoŝigi
compresser, comprimer	compress, zip	kompaktigi, zipi
compte d'accès	account	konto
configuration	configuration	konfiguraĵo
connecteur	connector	konektilo
cookie	cookie	kuketo
copier	copy	enpoŝigi
corbeille	recycle bin	rubujo, paperkorbo
coupe-feu, pare-feu	firewall	fajroŝirmilo
courrier électronique	email	retpoŝto, retmesaĝo
curseur	cursor	tajpmontrilo, kursoro
décompresser	uncompress, unzip	malkompaktigi, malzipi
démarrer	start	starti
disquette	floppy disk	diskedo
disque dur	hard disk	durdisko
domaine	domaine	domajno
dossier, répertoire	folder, directory	dosierujo
écran	screen	ekrano
éditer	edit	redakti
email, courriel	email	retmesaĝo, retpoŝto
émulateur	emulator	ŝajnigilo
en ligne	on line	konektike
en local	off line	nekonektite
encre	toner	inko
enregistrer	register	registri
envoyer	send	sendi
exécuter	execute	plenumi
exporter	upload	aŝuti
faire défiler	scroll	rulumi
faire glisser	drag	treni




Dankon al nia amiko kaj kontribuanto Bernard VIVIER, kiu plenumis peton de pluraj legantoj de nia bulteno, ankoraŭ novicoj pri komputiko.

La Informilo



fichier	file	dosiero
fichier exécutable	executable file	plenumebla dosiero
foire aux question	FAQ	oftaj demandoj
formater	format	strukturi
forum	forum	forumo
fournisseur d'accès, opérateur	acces provider	Interret-peranto
gratuciel	freeware	ĉiesajo
graver	burn	bruligi
graveur CD	CD-rom writer	laserdiska registrilo
icône	icon	piktogramo
imprimante	printer	printilo
imprimer	print	printi
Internet	Internet	Interreto
lecteur CD	CD-rom reader	laserdiska legilo
lien	link	ligilo
lien hypertexte	hyperlink	hiperligilo
Linux	Linux	Linukso
liste de diffusion	mailing list	dissendolisto
logiciel	software	programaro
Macintosh	Macintosh	Makintoŝo
mémoire	memory, storage	memoro, memorilo
menu	menu	menuo
menu principal	main menu	ĉefa menuo
message	message	mesaĝo
mise à jour	update	ĝisdatigo
modem	modem	modemo
moteur de recherche	search engine	serĉilo
navigateur	browser	foliumilo, krozilo, TTT-legilo, retumilo
naviĝuer	browse	foliumi
nom d'utilisateur	user name	uzantnomo
numérique	numeric, digital	cifereca
ocr	ocr	optika signorekono
octet	byte	bajto
ordinateur	computer	komputilo
page	page	paĝo
page d'accueil	home page	frontpaĝo, hejmpaĝo
par défaut	default	defaŭlta, implicita, apriora
périphérique	peripheral	periferiaĵo
pièce jointe	attachment	aldonaĵo
police de caractères	font	tiparo
presse-papier	clipboard	poŝo
processeur	processor	procesoro
programme	program	programo
reformater	reformat	restrukturi
remplacer	overwrite	anstataŭigi
sauvegarder	save	savi, registri, konservi
scanner	scan	skani
selectionner	select	apartigi
site web	Web site	TTT-ejo
souris	maus	muso
spam	spam	spamo
système d'exploitation	operating system	mastruma sistemo
tableur	spreadsheet	tabelkalkulilo
taper	type	tajpi
télécharger	download	elŝuti
touche	key	klavo
touche entrée	enter	eniga klavo
traitement de texte	text processor	tekstprilaborilo
unité centrale	central processin unit (cpu)	centra aparato
virus	virus	viruso
webmestre	webmaster	teksestro, TTT-estro
windows	windows	Vindozo





La matena gazeto "Var Matin" (92 000 ekz) anoncis la fondon de nova Esperanto-Asocio sub la nomo "Esperanto-Toulon-Var 2005". Urbo de ĉ. 200 000 loĝantoj, ĝemelita kun Mannheim (Germanio), Toulon (Tulono) estas milithaveno. Ĝi situas preskaŭ mezvoje inter Marsejlo kaj Nico. "Var" estas la nomo de la departemento, kiu troviĝas rande de Mediteraneo.

La iniciato fondi tiun asocion ŝuldĝas al s-ino Marie-José Duviard, kiu komencis diligente kaj entuziasme lerni Esperanton en oktobro 2004. Ŝi estas nepino de Ferdinand Duviard, kies nomo aperas en la "Enciklopedio de Esperanto". Li mem estis bofrato de la tre fama Esperanto-aktivulo Carlo Bourlet, pri kiu Dro Zamenhof diris tiom da bono en la tombejo de Montrouge en 1913...

Sekve de tiu artikolo, Marie-José Duviard ricevis inviton por prezenti Esperanton kaj la novan asocion ĉe la televido dum 4 minutoj. Vokis ŝin ankaŭ virino, kies patro estis esperantisto, kaj kiu deziras lerni la lingvon kaj aliĝi al la asocio.

Poŝta adreso : "Esperanto-Toulon-Var 2005", 9 rue Michel de Bourges, 83000 Toulon.

Tel. 06 12 52 08 14. Retadreso esperanto.toulon@wanadoo.fr

Un coin de paix dans un port de guerre



Le quotidien "Var Matin" (92 000 ex.) a annoncé la fondation d'une nouvelle association sous le nom "Esperanto-Toulon-Var 2005". Ville d'environ 200 000 habitants, jumelée avec Mannheim (Allemagne), Toulon est un port de guerre. Elle se situe presque à mi-chemin entre Marseille et Nice. "Var" est le nom du département qui borde la Méditerranée.

L'initiative de fonder cette association revient à Mme Marie-José Duviard, qui a commencé à apprendre l'espéranto avec assiduité et enthousiasme en octobre 2004. Elle est la petite-fille de Ferdinand Duviard, dont le nom apparaît dans l'"Enciklopedio de Esperanto". Il était lui-même

beau-frère du très fameux militant de l'espéranto Carlo Bourlet dont le Dr Zamenhof avait dit tant de bien en 1913 au cimetière de Montrouge.


Suite à cet article, Marie-José Duviard a été invitée à présenter l'espéranto et la nouvelle association à la télévision durant 4 minutes. Elle a été appelée aussi par une dame dont le père décédé était espérantiste et qui souhaite apprendre la langue et adhérer à l'association.

Adresse postale : "Esperanto-Toulon-Var 2005", 9 rue Michel de Bourges, 83000 Toulon.

Tél. 06 12 52 08 14. Courriel esperanto.toulon@wanadoo.fr

Service de presse de SAT-Amikaro

Malbonaj vatikanaj ondoj...



Unu estas kardinalo, la alia simpla pastro. Sed ambaŭ ĵus estis kondamnitaj je dek tagoj da enkarcerigo -"kun favora prokrasto"-, pro "elektromagneta polucio". Respektive prezidanto kaj ĝenerala direktoro de Radio Vatikano, Roberto Tucci kaj Pasquale Borgomeo estras tiun radiostacion kreita en 1931, "poliglota mikrokosmo je la servo de la papo kaj de la katolika eklezio". Elsendoj okazas en 40 lingvoj* tra la rtuta mondo.

Sed jen la afero... Por trafi la plej malproskimajn aŭskultantojn, en ĝangalo aŭ en stepo, la stacio postulas potencajn elsendilojn. Tro potencaj laŭ la opinio de la "najbaroj" en Santa Maria di Galeria, 30 kilometrojn

norde de Romo, loko, kie staras surkampe okultrafa aro da antenoj ! La tieaj loĝantoj plendas pro parazitigo de siaj telefonoj kaj komputiloj, sed ĉefe malkvietiĝas pro la alta proporcio de leŭkemio, trifoje pli granda ol tiu konstatita en aliaj regionoj, laŭ raporto de surloka agentejo prizorganta sanstaton de la loĝantaro. La estraro de Radio Vatikano miras pro tiuj "senbazaj timoj", kaj apelaciis.

Jen iom embarasa dosiero por la freŝelektita Benedikto la XVI-a...

- *inkluzive Esperanto -

Télérama 2889 -- -25a de majo 2005

Kiu pagas ?

France Télécom privilegias la angleparolantajn klientojn : <http://www.francetelecom.com/en/tools/others/contactus.html>

Resumo : la entrepreno disponigas al la angleparolantoj vivantaj en Francio vokcentron malfermita de la 8a 30 ĝis la 20a por respondi al ili en la angla. Ĉar temas pri **senpaga voknumero** (0800 364 775), divenu kiu pagas ? (Informo de Grégoire Colbert).

Kial France Télécom ne fakturas tiun servon al tiuj, kiuj uzas ĝin anstataŭ al la tuta abonantaro ?

Qui paye ?

France Télécom privilégie les clients anglophones

france telecom : <http://www.francetelecom.com/en/tools/others/contactus.html>

Résumé : l'entreprise met à la disposition des anglophones résidant en France un centre d'appel ouvert de

8h30 à 20h00 pour leur répondre en anglais.

Comme le **numéro d'appel est gratuit** (0800 364 775), devinez qui paye ? (Information de Grégoire Colbert).

Pourquoi l'agence France Télécom ne facture-t-elle pas ce service à ceux qui en font usage plutôt qu'à tous les abonnés

Pres-komunikoj de SAT-Amikaro

JÓŽA ÚPRKA ĉeĥa pentristo.

Nia amiko Roberto estas pasia kolektanto kaj ŝatanto de artaĵoj. Li deziras prezenti al ni la ĉeĥan pentriston JÓŽA ÚPRKA, kiun li malkovris dank'al Esperanto dum siaj vojaĝoj. Li sukcesis akiri multajn reproduktaĵojn de tiu talenta pentristo. Jen lia pasia rakonto kaj liaj surpriziĝoj, kiujn li nomas ĉi-tie "ŝoko".

A. Grossmann

ENAMIĜO AL ĈEĤA KULTURO

En 1996 mi partoprenis la Universalan Kongreson en Prago. Iam mi ĉeestis, laŭ la programo de UK, konferencon far de eminenta esperantistino origine el Moravio, pri la ĉeĥa kulturo, nome pri pentraĵoj. Ŝi prezentis diapozitivojn kaj HO! (*unua ŝoko!*) mi enamiĝis en iu verko de la pentristo JÓŽA ÚPRKA: reprezentaĵo de infanoj el Moravio en lokaj kostumoj..... legantaj librojn en tombejo!

Dum la restado en Prago, do dum UK, mi loĝis ĉe privata gastigantino: Maria.... kaj revenante vespere al mia ĉambro: *dua ŝoko!* Mi vidis tiun reproduktaĵon de la "Infanoj en tombejo" de Józsa ÚPRKA pendanta sur la muro de la viv-ĉambro!

Merkrede dum la UK-semajno, estas tradicie libera tago; mi vizitis la urbon en streĉa decido trovi ie ajn libron pri Józsa ÚPRKA. Kiom da vendejoj mi vizitadis, sed nenia sukceso.... kaj iam iu viro klarigis al mi, ke en Prago (regiono Bohemio) oni ne trovas verkon de Józsa ÚPRKA, ĉar ĉi-tiu pentristo venas de Moravio, kies ĉefurbo estas BRNO. *

Senluziigita mi revenis vespere ĉe mia gastigantino Maria kaj klarigis al ŝi mian malsukceson. "*Roberto – diris Maria – mi donacas al vi tiun bildon, tiun reproduktaĵon, kiu pendas ĉe la muro*" HO! *Tria ŝoko!*

De 1996, en taŭga loko de mia apartamento tronas la "Infanoj de Józsa ÚPRKA" kaj mi eterne dankas al Maria pro ŝia afableco!

Sed tamen pensis mi, tiu pentristo verkis aliajn "bildojn"! Kiamaniere akiri libron pri tiu pentristo?? Ĉu vojaĝi al Brno? Iam mi ekkonis la nomon kaj adreson de iu esperantisto, kiu loĝas en BRNO mem: s-ro Jan Werner, kiu estas fakulo pri terminaroj de fakaj metioj kaj membro de TAKE! Mi kontaktis lin pere de leteroj? **

Ne! Pere de la helpo de la komputoro de André Grossmann, kaj finfine s-ro WERNER trovis dokumentaĵojn pri Józsa ÚPRKA, ne en formo de moderna libro sed ... antikvaĵojn ĉe brokantistoj en BRNO : *kvara ŝoko!* mi akiris ducent reproduktaĵojn de la pentraĵoj de Józsa ÚPRKA. (120 nigre-blankaj kaj 60 koloraj) kaj dudek "specialaj kostumoj" el Moravio. Poste mi petis al bindisto krei belan libron kun la centoj da folioj.

Jen kiamaniere, pere de Esperanto, oni povas malkovri la kulturojn de aliaj landoj (kaj krome aĉeti diskojn de la enlanda muziko). Jes, iamaniere mi estas kolektanto de "diversaj kulturaĵoj" el la mondo.

Roberto Kueny



Infanoj legantaj ĉe la tombejo



HI ZEDUŠEA NA LARMAKÉ, 1906

 Mi revenu al la steleto (*)! Dum la vizitado al la urbo Prago tiun merkredon mi malkovris ankaŭ alian pentriston, kies verkoj estas ĉie ajn en Prago: Alfons MUCHA (prononco: muĥa) kaj kies desegnaĵojn mi ankaŭ ŝatas, mi aĉetis libron kaj kolektis dum kvin jaroj kalendarojn kun la desegnaĵoj de Alfons MUCHA. (Vidu raporton en la n° 122 de La Informilo de julio 2003.)

 Kaj la du aliaj steletoj (**)? signifas, ke Roberto ne posedas tiun "komputoran beston"!... sed aliajn bestojn, kiujn "li frandas en telero" post kelkaj monatoj da bredado! Oni povas esti esperantisto kun aŭ sen komputoro, ĉu ne?



Jóža Úprka naskiĝis en 1868-02-26, mortis en 1929-09-08, devenis el la sudmoravia regiono oriente de Brno, nomata Moravia Slovakio. En la pentraĵoj li aplikis motivojn el sia regiono, kiu ĝis hodiaŭ forte konservis siajn popolajn tradiciojn: kantojn, kostumojn, dancojn, folklorajn kutimojn. Li studis Art-Akademion en Prago kaj poste en la germana-bavaria Munkeno. Oni diras pri li, ke lia arto esprime situis inter romantika historiismo kaj secesia (art nouveau) dekorativismo. Liaj pentraĵoj samtempe fariĝis etnografiaj dokumentoj.

Jan Werner



Serĉado de helpantoj por tradukado...

Nova laboro...



Spomenka Ŝtimec petis min esti la kunordiganto por la franca traduko de la verko "la Zamenhof-strato"... kaj mi akceptis. Tiu verko jam vivas la duan eldonon por la esperanta lingvo, kaj jam estas tradukita en ses lingvoj. La eldonisto kaj la mono por eldoni jam estas trovitaj. Restas trovi tradukantojn.

Mi estos la kolektantino de la laboro farita (ne la plej pinta korektantino, pluraj kontrolos la manuskripton post mi). Mi esperas doni la laboron per tranĉoj de averaĝe 16 ĝis 20 paĝoj (sed mi povos doni pli aŭ malpli laŭ la ebloj de la tradukantoj). La personoj, kiuj bonvolos helpi, devos akcepti la paĝojn indikatajn de mi (ne indas, ke ĉiuj traduku la samajn paĝojn, nek ke kelkaj paĝoj restu sen traduko...) Mi indikos la paĝojn tradukendajn, sekvante laŭvice la paĝojn.

La bonvoluloj ricevos rete la ĝis nun tradukitajn paĝojn por havi ideon pri la stilo adoptita. (Mi tradukis kun amikino por vidi mem la problemojn kaj ni tradukis ĝis la paĝo 54.)

Mi informos regule pri la progreso de la laboro. Ju pli multaj ni estos, des malpli da laboro por ĉiu.

Ne hezitu helpi, eĉ se vi estas modestaj tradukantoj. En tradukado, ĉiu etapo estas grava. La personoj, kiuj tajpas la unuan muelaĵon, estas tiom gravaj kiom la personoj, kiuj fajnigas la laboron.

Mi planas unu jaron por la kolekto de paĝoj, kaj unu plian jaron kun la helpo de spertuloj por la fajnigo de la tuta libro. Mi esperas, ke la helpantoj trovos plezuron en tradukado, ĉar la ŝato al la verko estas la plej bona motoro ! La personoj, kiuj proponos helpi, devos anonci kiom da paĝoj ili pretas traduki, je kiu dato ili povos komenci labori, kaj per kiu ritmo ili esperas labori (ĉu ili bezonas unu tagon aŭ unu semajnon por unu paĝo...)

Mi antaŭdankas.

Ginette MARTIN gimavo@wanadoo.fr

☎ 03 29 24 68 46

92, rue du Riant Côteau - FR 88240 SAULXURES-sur-MOSELLOTTE

... Ĉiufoje kiam vi aĉetas libron,
vi ne nur fruktigas nian libroservon,
sed vi ankaŭ atestas pri la elstara valoro
de nia esperanto-kulturo !...



El nia libroservo

Informoj



⇒ La libroservo partoprenos la Gajan semajnfinojn en Breisach la 8a/9an de oktobro 2005. Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu gxin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE libroservo.efe@wanadoo.fr)

Esperanto en bildstrioj



*Post Tincjo en Tibeto kaj antaŭ Spiruo, aperis la unua
albomo de*

GASTONO

Gastono 1, bildstrio, 48 p, Franquin, *Esperanto-Jeunes* 8,00 €.

La aventuroj de la Gastono Lafuŝo en la redaktejo de Spiruo, esperantigitaj dank' al la valora laboro de aktivuloj de Esperanto-Jeunes. Traduko: David Hromada. Enpaĝigo : Armelle Piolat, Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau. Lingve reviziita de Xavier Godidier, Jean Lazert kaj Laurent Vignaud



Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.



2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))
 3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.
- Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo



Ĵusnaskitoj



El verva vivo ĵurnalista, membiografio, 272 p, **Stefan Maul**, *Flandra Esperanto Ligo* 20,00 €. Stefan Maul rakontas pri 45 jaroj da ĵurnalista kaj esperantista vivo..

lam, kiam Poezio, 64 p **Bruna Ŝtono Impeto**, 5,00 €
Nova poemaro jxus eldonita de mickael Bronstein.

« *Mi haltu ĉe la dato kvindek kvin,
mi danku Dion,
pro l'ŝanco, ke ĝis mia vivofin'
mi diros ĉion.*

*Sed nun, ĉe l'interkrea malkomfort',
kun frunta falto mi finu.
Kaj min gvidu mia sort'
ĝis vica halto »*



Leksikaj ekskursoj-Instulibro, 192 p, **De Vleminck/Van Damme F.E.L.** 15,00 € Jen la tria volumo de la serio. Dek unu ĉapitroj por progresi en esperanto, per ekzercoj, ludoj, malkovro de esprimoj kaj proverboj...

La nova P.I.V. 2005 - Vortaro, 1270p, **Opo, S.A.T.**
80,00 €. Nova eldono de la ĉefvortaro de Esperanto, kiu aperas nun en blua koverto. Laux enhavo, tiu eldono tre similas al tiu de 2002, krom kelkaj korektoj.



Vojaĝo en esperanto-lando - lernolibro, 280p, 18,00 €. *U.E.A.*

Finfine reaparis tiu internacia lernolibro, kies dua eldono tiom sukcesis, ke gxis estis elĉerpita jam de pluraj monatoj.

Tiu tria reviziita eldono enhavas 26 ĉapitrojn kaj ofertas al progresantoj vojaĝxi tra la mondo malkovrante la movado-centrojn kaj la diversajn aspektojn de la esperanta kulturo.

Ĉiu ĉapitro enhavas post tesktoj komenton kaj ekzercojn por lingva praktiko.



MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-
-
-
-
-

al jena adreso:

S-ro/ino

-
-
-
-

En

la

Subskribo:



ni prouu



rideti !...



Geedzoj veturas tra densa arbaro, kie kruciĝas allogaj padoj...

Subite, la edzino, kiu pli kaj pli triste mienis, esploras!...

„Kio okazas karulineto mia? Ĉu ne plaĉas al ci tiu trankvila, malrapida veturado, en loko, kiun ni multfoje vizitis?

- Nu... Mi nun ja certas... Min vi ne plu amas! Kiam ni ne estis ankoraŭ geedzoj, via aŭto ĉiam paneis ĉe la lasta krucvojo, kiun ni ĵus pteterveturis!...”

★

Iu junulino, dekokjara, avertas la patrinon, ke ŝi estos gasto en veturilo de amiko, por festi iun datrevenon. La patrino taksas oportune averti sian idinon;

„Mi esperas, karulineto, ke vi, dume la veturado, ne kondukos facilanima kiel tiu pet-veturistino, kiu iam haltigis vian patron survoje...

- Nu, ĉu vere gravis? Kio okazis al ŝi?

- Ŝi devis edziniĝi al li!...”

★



Viro, akuzita pro ŝtelo de aŭto, kiun li cetere difektis, defendas sin tiel argumente:

„Estimata juĝisto, vidu!... Bonan ideon tamen mi havis, ĉu ne? Imagu, ke mi estis tiom ebria, ke mi konsideris ja riska afero reveturi hejmen per mia propra aŭto!... „

★

Dum la balo, kiu konkludas la edziĝofeston, la juna virino flustras al la orelo de sia freŝbakita edzo:

„Karuleto mia, se vi imagus kiom intense mi sopiras al la „nokto-ripozo”, unu apud la alia...

- Ankaŭ mi malpacientiĝas!... Ĉu ankaŭ al vi premas terure la novaj ŝuoj?...”

★

Plenplenas la aŭtobuso... Juna virino sukcesas tamen eniri je la lasta haltejo kaj penas teni sin al iu seĝodorso. Unu iom aĝa viro ekstariga, okulumas ridetante al la ulino kaj invitas ŝin geste preni la liberigitan sidlokon... sed ŝi tuj petas lin, ankaŭ kun ĉarma rideto, reokupi la sidlokon, per ĝentila premo sur lia ŝultro. Post nelonge, li denove volas leviĝi, sed ŝi denove premas lin sur sian lokon. Je la kvara fojo, finfine, li sukcesas firme stariĝi kaj petegas:

„Sinjorino, mi jam troveturis tri haltejojn... Ĉu vi eventuale konsentus finfine lasi min elaŭtobusiĝi?”

★



La familio interkonsiliĝas, cele elekton de la loko por somera libertempo. La deksep-jara filo, certagrade „moderna” knabo, kiu ĝis nun silentis, enmiksiĝas:

„Nu, mi ŝatus iri ialoken, kie mi jam delonge ne estis...”

Reagas tuj la patro, malfermante sian monujon;

„Jen tridek eŭroj... kaj iru al la frizisto!”

★



Iu gasto en hotelo, ne tute sobra je tiu nokta horo, klopodas vane manipuli ion en kabino de la teretaĝo, ĉe la piedo de la ŝtuparo... Finfine, li eliras kaj alparolas la deĵoranton;

„Ĉu vi scias, ke la lifto rifuzas normale funkcii?... Mi komencas malpacientiĝi!

- La lifto estas en ordo, estimata sinjoro, trankviligas lin la hotelstevardo... sed devas gravi afero kun via korespondanto... Jam preskaŭ duonhoron vi staras en la telefonkiosko!”

★

Someruminto vizitas vendejon de vivaj bestoj antaŭ ol reveturi al sia kutima loĝdomo.

„Ĉu vi havas pulojn?... Ducent... Aldomu ankaŭ cimojn... Cent!

- Mamma mia!... miregas la vendisto, tiujn etajn bestetojn mi ne havas, sed diable, klarigu al mi, kial vi ilin bezonus!...

- Mi forlasas mian luitan ĉambbron, kaj sur la pordo, interne, mi legis slipeton, kiu tekstis:

„Bonvolu remeti la loĝejon en la staton, en kiu ĝi estis, kiam vi alvenis!...”

Viro, kiu somerumas ĉe marbordo, renkontas amikon...

„Sed, kio okazas al vi? Vi ja surhavas bandaĝon sur la okulo!

- ... Hum, juna virino, kiu preparis sin por bano, ŝprucigis al mia vizaĝo specifan kontraŭsunan oleaĵon...

- Ĉu hazarde?

- ... Hum, ne... Tra la ŝlosiltruo de la banĉelo, en kiu ŝi senvestigis...”

★

Iu pastro organizis bonfarfeston helpe al sia paroko.

Inter la disponigitaj tabloj ekstere instalitaj, unu proponas allogajn kuketojn kovritajn je ĉokoladkremo... Apude staras kartono sur kiu oni povas legi:

«Atentu!... Forprenu nur unu kuketon... Jesuo rigardas vin!»...

Sur alia tablo simplaj pomoj... kun alia informkartono:

«Vi rajtas forpreni plurajn... Jesuo estas daŭre okupata por kontroli la sintenon de eventualaj kuko-ŝatantoj.»

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2006 ĝis 2008

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj tri jaroj. Se sur via adres-etikedo estas jam menciita 2006, tio signifas, ke via abono por 2006 estas jam pagita. Se ne, ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2005, pagi vian abonon al La Informilo kaj vian membro-kotizon por nia asocio.

JAROJ:	2006	2007	2008
Abonoj por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abonoj por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	6,30 eŭroj	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Vi povas pagi la koncernan sumon:

1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:

ESPERANTO FRANCE-EST poŝtĉekkonto 1997 72W NANCY

Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.

La mencio de via **adres-kodo** faciligas la laboron de nia kasisto:

ekzemple: abono Informilo + kotizo 2006 por **1025**

2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, disko, donaco al ktp por 2006, 2007 ktp

Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.

3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA

Ludwigshafen, je la nomo de: **Hans-Dieter Platz**. (menciu la celon de via pago)


4. Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY

(Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)

5. Okaze de ĝiro, vi povas samtempe komuniki rete vian adreson, adres-kodon kaj pago-celon al la kasisto uzante la jenan ret-adreson: andreo.gr05@free.fr


"ordinaraj kongresoj" ...

ONU, EU, OMS... ktp.





DESTRIBUULO




Krucvort-enigmo ☆

HORIZONTALE

1 Maldiŝanigo de la kristalino. 2 Specifa situacio de la merkato - persona pronomo. 3 Dekdua grafemo de la greka alfabeto - piedvesto. 4 Komponaĵo ludata antaŭ opero. 5 Virina nomo - preskaŭ nevidebla trueto sur la haŭto (fon). 6 Nedifina pronomo - ne kunprenis. 7 Diversspeca teksaĵo (rad) - moviĝi por atingi celon. 8 Restigadi en likvo por lavi (invers) - sufikso esprimanta pasivon - prepozicio. 9 Loĝanto de nordafrika lando - persona pronomo. 10 Parto de la ĉefa arterio - densa, bruna, aroma likvo preparita el faboj (fon) - ĝeni maloportune (rad). 11 Senti bezonon sin grati (rad) - prepozicio - rilata al rusa imperiestro.

VERTIKALE

A Rimedoj, kiel telefono, ekz. B Sedimento de riveroj - persona pronomo. C Parto de longa ostoj - prepozicio - fummaterio (rad). D Psika perturbo rilate al spaco. E Rokopeco - konjunktio. F Komenco de apetito - tenilo. G Fosiliaj ekskremento. H Kiel 7 horizontale (fon) - amerika papago (rad). I Greka litero - sufikso esprimanta pasivon. J Doni manĝaĵon - komenco de alergio. K Nedifina pronomo - firma, fortika, masiva.



"silab"- enigmo ☆

Helpe de la ĉi-subaj vort-eroj alfabete ordigitaj, plenigu la vertikalan vort-kolumnon. La difino de ĉiu vorto kuŝas dekstre. Legante la du vertikalajn krucumitajn kolumnojn, vi malkovros proverbon de Zamenhof.

at bro bui dio ebo ef et far ge go gre gru in kto le lo lo mor na ne no no no no no ok ok op
os po pro pr rap ri si so spe so sti to to umo ve zi

- | | | |
|----|---------------|--------------------------------------|
| 1 | + - - + - | tiu de Loreno bongustas |
| 2 | + - - + - - - | nepre bezonata por vivi |
| 3 | + - - + - - - | popolmuzika komponaĵo |
| 4 | + - - + - | aro da objektoj aŭ da personoj |
| 5 | + - - + - | malaperanta infekto-malsano |
| 6 | + - - + - - - | doni laŭrajte aŭ laŭmerite |
| 7 | + - - + - | paroladeti dum trinko-festo |
| 8 | + - - + - - - | li okupiĝas pri studado de homgrupoj |
| 9 | + - - + - | trista (literat.) |
| 10 | + - - + - | adoleskanto en Helenujo |
| 11 | + - - + - - | mallonga skribverketo |
| 12 | + - - + - | transigi de konto al alia |
| 13 | + - - + - - - | monato |
| 14 | + - - + - | faruno devenas ofte el ĝi |
| 15 | + - - + - - - | nekrozo de vaskula teritorio |
| 16 | + - - + - - - | pelto de didelfo |

" ... Jes !
La muso estas
supre maldekstre ...
Mi klakas ...
kaj nenion !
...
Tio ne funkcias ! "



Solvoj de la lastaj enigmoj (n° 130)

1 - Stvbrnz = "Ĉar ĉiu laboro noblas, kiam ĝi al stelo estas alkroĉita". (Raoul FOLLEREAU)

2 - Duon-vortoj = 1 kom-put-ado (kometo / putino / adopto)
2 bar-bak-ano (baroko / bakaĵo / anobio)

3 - Piramido =

al
alo
pola
alpoj
opaloj
paroloj
patroloj



UK – surpodiumas la internacia koruso



sukcesa jara kongreso de TEJO en ZAKOPANO



TALLIN – pleanera florvendejo en la malnova urbo